

43a Konferenco de ILEI, Matanzas, Kubo

Julio 11-17, 2010

Konferenca Libro

Konferenca temo:
Edukado por kultura proksimiĝo



Enhavo

Salutvortoj de la Loka Konferenca Komitato.....	3
LKK de la 43 ^a ILEI Konferenco.....	4
Saluto de la Prezidanto de ILEI.....	5
Seminario: Perflugiloj de interkultura vento.....	6
Mapo de Matanzas.....	7
Programo de Konferenco.....	8
Informoj pri prelegoj pri nia gastiga lando.....	14
Konferencaj kaj seminariaj aliĝintoj.....	16
Preparoj por la diskutsesioj.....	28
Taskoj sen plenumantoj.....	20
Tago de la Lernejo – programo por UK.....	22
Estrara raporto pri la jaro 2009 (de Małgosia Komarnicka).....	24
ILEI aktivis en Afriko en 2009 (rade).....	33
Instrukapabligo kaj edukcentroj en 2009.....	34
Raporto pri Juna amiko.....	35
Membroj de ILEI; Abonantoj de Juna amiko – laŭlande.....	36
Financa raporto (de Julija Batrakova).....	38
Kion faris ILEI en 2009? (smg).....	40
Raporto de la Ekzamena Komisiono (Mirejo Groĵan).....	41
Proponata regularo por retaj voĉdonoj.....	43
Konferenco 2011: En la lando de Hamleto (rade).....	44

© Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, 2010.
Sidejo: New Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Redaktoro: Stefan MacGill, Budapeŝto.

Finredakto: Julio 4, 2010. Presita en Kubo en min. 100 ekzempleroj.

Salutvortoj de la Loka Konferenca Komitato (LKK)

Nome de la kuba esperantistaro kaj speciale de la kubaj instruistoj, mi bonvenigas la partoprenantojn de la 43a ILEI-konferenco okazanta la duan fojon en Kubo. Ni konscias kiom grava estas la laboro de la instruistoj por la nuntempo kaj estonteco de nia movado, pro tio mi deziras ke la celoj de la konferenco kaj de la porinstruista seminario sukcese plenumiĝu. Mi certas ke tiu-ĉi 43a renkontiĝo de la internacia instruistaro estos firma paŝo por pli konkretigi kaj atingi la celojn de la dua agadkampo de la dekjara strategio de UEA kiu finiĝas ĉi-jare. Mi esperas ke ĉiuj miaj kolegoj pasigu agrablajn momentojn en la Hotelo Canimao kaj ke ili ĝuu la belan naturpejzaĝon kiun la provinco Matanzas donacas al la vizitantoj.

Bonvenon al Kubo!



Julián Hernández Angulo: Prezidanto de LKK

LKK de la 43^a ILEI Konferenco:

- Julián Hernández Angulo: Prezidanto (1)
- Marta Eugenia Alonso Gutiérrez: Organizo (2)
- Maritza Gutiérrez González: Financo
- Pedro Fernández Rodríguez: Membro (3)
- Gonzalo Collantes García: Membro (4)
- Carlos Ernesto Hernández Montes de Oca: Membro (5)

❶ vidu la antaŭan paĝon.

❷



❸



❹



❺



Saluto de la Prezidanto de ILEI



Jen ni staras denove antaŭ ekstereŭropa konferenco! La unuaj dudek tri konferencoj ĉiuj okazis en Eŭropo, eĉ se unu el tiuj okazis transmare (Malto, 1980). En tiu periodo la Universala Kongreso iris ekstereŭropon kvinfoje (Portland 1972, Rejkjavik 1977, Brasília 1981, Vankuvero 1984, kaj Beijing 1986). Pro manko de rimedoj, kontaktoj aŭ deziro ILEI tiam postrestis. La trarompo okazis en 1990, ĝuste en Kubo, do ni nun kunvenas por celebri la tridekan datrevenon de tiu epokfara – eĉ se intima – konferenco en Hanabaniljo en 1990. Ĝi kunvenigis nur 35 partoprenintojn, el 18 landoj, sed la etoso, la ĉirkaŭaĵo kaj la programo estis tre memorindaj.

Ekde tiam la ritmo de ekstereŭropaj konferencoj intensiĝis, Kangnam en Koreio en 1994 kaj Melbourne, Aŭstralio, en 1977. Tra tiuj jaroj ILEI kuraĝe sekvis UEA ĉiam kiam ĝi ekstereŭropiĝis. Sed je tiu punkto la tendenco venis al fino. En 2000 UEA iris al Israelo, ILEI al Bouresse (Francio) kun nur 23 konferencanoj, en 2002 UEA al Fortaleza (Brazilo) kaj ILEI-konferenco, la solan fojon en sia historio, ne okazis. En 2004 UEA iris al Ĉinio, ILEI restis en Bratislavo, ĉi-foje kun kredinda nombro da partoprenintoj, paralele kun la SAT-kongreso. Nur en 2007 ILEI reprenis sian vojaĝemon, al Ranzan en Japanio kun respektinda nombro da partoprenantoj.

Se 1990 estis por ILEI epokfara momento, la dua devas esti en 2008, pro du kialoj. Temis pri revolucia decido konferenci unuafoje en Afriko, sed pli aŭdace kaj unuafoje, organizi konferencon en ekstereŭropa lando, kie ne okazas Universala Kongreso. Por la partoprenintoj, ĝi nepre estis sukcesa, sed pli vaste, kiel ILEI-konferenco, la prijuĝo estis pli miksitita. Lecionoj lernindas, ĉar ILEI certe iam volos reiri konference al Afriko.

Post Benino sekvis Krakovo en 2009, kiu provizis almenaŭ parte sekvindan modelon por Eŭropa konferenco – buntega programo kun seriozaj universitataj kontaktoj. Kaj nun 2010. Unuafoje, ni revenas al jam vizitita ekstereŭropa lando. Kiaj komparoj? La nuna konferenco estos malpli intima – kun inter 55 kaj 60 partoprenantoj; ni fidus ke ĝi estos almenaŭ same memorinda. La paralela seminario estos tute nova elpaŝo. En la konferenca programo, ni volas doni egalan pezon al la faka, la organiza kaj la distra flankoj kaj partoprenigi ĉiun ĝis la maksimumo.

Ni fidus ke tio sukcesos, kaj deziras al vi ĉiuj neforgeseblajn tagojn!

Stefan MacGill

Seminario: Per flugiloj de interkultura vento

La ideo pri iu speciala seminario por Esperanto-aktivuloj dum la 43a ILEI-konferenco jam formiĝis dum la lastajara konferenco 2009 en Krakovo, Pollando. La motivo estis eluzi la proksimecon de la tri Esperanto-eventoj (UK, ILEI-konferenco kaj IJK) al la latinamerikaj landoj por proponi al Esperanto-aktivuloj el tiu mondparto altnivelan seminarion pri instruado de Esperanto, interkultura lernado per Esperanto, kaj ĝenerale pri la Esperanto-movado kaj laboro por ĝi. La fakto estas, ke latinamerikaj homoj malofte havas eblecon partopreni internaciajn kongresojn kiel UK aŭ IJK, kaj des malpli la ŝancon partopreni seminarion pri la menciitaj temoj. Pri Eŭropa UK aŭ seminario la ordinara latinamerikano nur povas revii pro la altaj flug- kaj restadkostoj.


La plano konkretiĝis per kunlaboro de ILEI, Amerika Komisiono de UEA kaj TEJO. Ne nur troviĝis la organizantoj, sed ankaŭ la financantoj, ĉar por multaj latinamerikanoj eĉ vojaĝo al Kubo kostas multege. La financadon partoprenis ILEI per sia kaso de la projekto Interkulturo, la fondaĵo Mondo el Germanio, la fondaĵo Anny Hartwig el Germanio, TEJO, Triamonda Kongresa Fondaĵo de UEA kaj la Amerika Fondaĵo de UEA. Meze de januaro oni informis pri la konkurso por ricevi stipendiojn. Entute venis pli ol 25 petoj el diversaj landoj de la regiono. Entute ni sukcesis disdoni 19 stipendiojn, kiuj parte kovras la restadon kaj en kelkaj kazoj la vojaĝkostojn. Nun homoj el Meksiko, Dominika Respubliko, Haitio, Nikaragvo, Bolivio kaj Urugvajo povas ĉeesti nian 43-an ILEI-konferencon. En la tujpostaj du semajnoj ili partoprenos daŭrigan klerigadon kaj trejnadon dum la UK kaj IJK.



La seminariaj temaro kaj programitaj aktivaĵoj estas plej praktika kontribuo al la konferenca temo: *Edukado por kultura proksimiĝo*. Bonvenon al ĉiuj seminarianoj. Ni lernu kaj lernigu nin reciproke, kaj ni esperu ke la ricevintoj de la stipendio estonte formos kernon de loka aŭ nacia movado en siaj landoj.

(Rade/Martin S.)

Mapo de Matanzas



Programo de la Konferenco

Dimanĉe, post la vespermanĝo (la unua konferenca manĝo) okazos Interkona vespero.

Klarigo de mallongigoj.

INTK = Interkultura grupo; A1 kaj A2 = Aktivuloj 1 kaj 2.

La programo havas tri fadenojn: fakan, organizan kaj distran. Ni emfazas, ke la komitatkunsidoj de ILEI estas publikaj. Kvorumo estos 17 komitatanoj. Ni starigos laborgrupon pri komunikado por pretigi gazetarajn komunikojn, laborgrupon pri lerneja agado kaj tria pri decidota temo. Ni provos trovi eblon kunvenigi la laborgrupojn pli ol unufoje.

Programŝanĝoj estas atendeblaj.



	Lundo, 12an de julio, 2010				
Horaro	Konferenco		Seminario		
			INTK	A1	A 2
08:00 - 09:00	Matenmanĝo				
09:00 - 09:15	Malfermo	Bonvenigo			
09:15 - 09:30		Salutoj			
09:30 - 09:45		Muzika interludo			
09:45 - 10:00		Enkonduko en la konferencan temon			
10:00 - 10:15		Enkonduko en la seminarion			
10:15 - 10:30		Programaj kaj teknika klarigoj. Himno			
10:30 - 10:45	Kafpaŭzo				
10:45 - 11:00	Komuna kunsido por detaligi la programon, decidi pri laborgrupoj, elekti program-gvidantojn, kaj raportistojn, teamon por gazetaraj komunikoj kaj raportoj (SMG)		Organizaj konsideroj. Antaŭtaksado.		
11:00 - 11:15			Gramatika testo kaj ĝia analizo		
11:15 - 11:30					
11:30 - 11:45					
11:45 - 12:00	Paŭzo				
12:00 - 12:15	Juan L. Besada Toledo: Naskiĝo de la kubaj kulturo kaj nacio		Martin Schäffer aŭ/kaj		
12:15 - 12:30	Maritza Gutiérrez González: Kuba Alfabetiga Programo. Sociaj Sekvoj		Radojica Petrović: La lingva strukturo de Esperanto.		
12:30 - 12:45			Votfarado. Oftaj lingvaj kaj E-didaktikaj eraroj kaj dilemoj.		
12:45 - 13:00					
13:00 - 15:00	Libera tempo				
15:00 - 16:00	Ĉefprelego pri la konferenca temo Edukado por kultura proksimiĝo – kun diskuto.				
16:00 - 16:15	Paŭzo				
16:15 - 16:30	Komitato: Kunsido 1 Konsistigo kaj raportoj pri 2009	ILEI-UEA Ekzamenoj: Antaŭtesto (se okazos)	Interkultura ludo:		Martin Schäffer. Paroliga kurso
16:30 - 16:45			Duopaj konversacioj kun desegnado		
16:45 - 17:00			Ekspozicado de tiuj desegnaĵoj.		
17:00 - 17:15					
17:15 - 17:30					
17:30 - 17:45					
17:45 - 18:00	Marta Eugenia Alonso Gutiérrez kaj/aŭ Pedro Fernández Rodríguez: La hispana eksprese				
18:00 - 18:15					
18:15 - 18:30					
18:30 - 18:45	Komuna kunveno: Tuttaga resumo				
18:45 - 19:00					
19:00 - 20:30	Vespermanĝo				
20:30 - --	Kviza kaj skeĉa vespero – montru viajn konojn pri nia Ligo!				

Mardo, 13an de julio, 2010				
Horaro	Konferenco	Seminario		
		INTK	A1	A2
08:00 - 09:00	Matenmanĝo			
09:00 - 09:15	Tuttaga ekskurso al Varadero. Ĝi estas inkluzivita en la prezo. Kiuj ne volas iri al Varadero povas iri al la Rivero Canimar piede.	Radojica Petrović (aŭ alia): Morfologio kaj sintakso de verboj. Oftaj lingvaj kaj E-didaktikaj eraroj kaj dilemoj.		Paroliga kurso
09:15 - 09:30		Kafpaŭzo		
09:30 - 09:45		Martin Schäffer. Bazaj faktoj kaj ideoj pri la Esperanto-movado kaj Esperanto-komunumo		Paroliga kurso
09:45 - 10:00		Paŭzo		
10:00 - 10:15		Radojica Petrović: La projekto Interkulturo (IK): celoj, metodoj, taskigo de esplortemoj	Martin Schäffer. Verkado de gazet-artikoloj	Paroliga kurso
10:15 - 10:30		Libera tempo / Promena ekskurso al la rivero Canimar		
10:30 - 10:45				
10:45 - 11:00				
11:00 - 11:15				
11:15 - 11:30				
11:30 - 11:45				
11:45 - 12:00				
12:00 - 12:15				
12:15 - 12:30				
12:30 - 12:45				
12:45 - 13:00				
13:00 - 15:00				
15:00 - 15:15	Komuna kunveno: Tuttaga resumo			
15:15 - 15:30	Vespermanĝo			
15:30 - 15:45	Kanta kaj danca programo			
15:45 - 16:00				
16:00 - 16:15				
16:15 - 16:30				
16:30 - 16:45				
16:45 - 17:00				
17:00 - 17:30				
17:30 - 18:00				
18:00 - 18:30				
18:30 - 19:00				
19:00 - 20:30				
20:30 - --				

Horaro	Merkredo, 14an de julio, 2010				
	Konferenco		Seminario		
			INTK	A 1	A 2
08:00 - 09:00	Matenmanĝo				
09:00 - 09:15	Komuna Kunveno: tagaj informoj kaj ŝanĝoj				
09:15 - 09:30	Stefan MacGill Transgardo de lingvoinstruaj metodoj. Didaktika gramatiko de Esperanto, niaj unike malfacilaj punktoj			Paroliga kurso	
09:30 - 09:45					
09:45 - 10:00	Kafpaŭzo			Paroliga kurso	
10:00 - 10:30					
10:30 - 10:45	Gonzalo Collantes García: Metodologio de Esperanto el psikopedagogia vidpunkto			Paroliga kurso	
10:45 - 11:00					
11:00 - 11:15	Julián Hernández A.: Tra la Spuro de Esperanto-Leciono			Paroliga kurso	
11:15 - 11:45					
11:45 - 12:00	Paŭzo				
12:00 - 12:15	Labor-grupo 1	Labor-grupo 2	E-gramatiko: Oftaj lingvaj kaj E-didaktikaj demandoj, eraroj kaj dilemoj.	Paroliga kurso	
12:15 - 12:30					
12:30 - 12:45					
12:45 - 13:00	Libera tempo				
13:00 - 15:00					
15:00 - 15:15	Juan Ramón Rodríguez Gómez: La faktoj parolas. Eo en Kubo 1904-1930		Inter-kulturaj lingvaj ludoj	Martin Schäffer: Intervjuo pri Eo	Paroliga kurso
15:15 - 15:30					
15:30 - 15:45	Moerbeek: Fakprelego				
15:45 - 16:00					
16:00 - 16:30	Paŭzo				
16:30 - 16:45	Semer: Falsaj Amikoj		Lecionplanado. Taskigo de provlecionoj		Paroliga kurso
16:45 - 17:00					
17:00 - 17:15	Marta Eugenia Alonso Gutiérrez kaj/aŭ Pedro Fernández Rodríguez: La hispana eksprese		Ekzamenoj: Skriba parto.		
17:15 - 17:30					
17:30 - 17:45					
17:45 - 18:00					
18:00 - 18:30	Komuna kunveno: Tuttaga resumo				
18:30 - 18:45					
18:45 - 19:00					
19:00 - 20:30	Vespermanĝo				
20:30 - --	Vespera programo: Kuba vespero				

Horaro	Ĵaŭdo, 15an de julio, 2010			
	Konferenco		Seminario	
			INTK	A1
08:00 - 09:00	Matenmanĝo			
09:00 - 09:15				
09:15 - 09:30	Komuna Kunveno: Enkonduko al la tago: informoj kaj ŝanĝoj			
09:30 - 09:45				
09:45 - 10:00	<i>Duncan Charters</i> (alternative <i>Radjojica Petrović</i>): E-kulturo. Instruado pri ĝi kaj utiligo por E-instruado			Paroliga kurso
10:00 - 10:15				
10:15 - 10:30				
10:30 - 10:45				
10:45 - 11:00	Kafpaŭzo			
11:00 - 11:15	La vojo antaŭen pri... laborfortoj kaj profesiigo (SMG)	<i>MEAG</i> kaj/aŭ <i>PFR</i> : La Hispana eksprese	<i>Martin Schäffer</i> : Kiel organizi kursojn de Esperanto	Paroliga kurso
11:15 - 11:30				
11:30 - 11:45				
11:45 - 12:00				
12:00 - 12:15	Paŭzo			
12:15 - 12:30	Paneldiskuto pri la konferenca temo	Ekzamenoj: Parola parto	Analizo de provlecionaj planoj	Paroliga kurso
12:30 - 12:45				
12:45 - 13:00				
13:00 - 15:00				
15:00 - 15:15	Libera tempo			
15:15 - 15:30	Duontaga ekskurso al Matanzas	Grupa solvado de IK-taskoj	Boris Legault: Interreta agado por Esperanto	Paroliga kurso
15:30 - 15:45				
15:45 - 16:00		Paŭzo		
16:00 - 16:15		Verkado de raportoj pri la IK-taskoj	Łukasz Żebrowski : Junulara agado	Paroliga kurso
16:15 - 16:30				
16:30 - 16:45				
16:45 - 17:00				
17:00 - 17:15				
17:15 - 17:30				
17:30 - 18:00				
18:00 - 18:30		Libera tempo		
18:30 - 19:00	Komuna kunveno: Tuttaga resumo			
19:00 - 20:30	Vespermanĝo			
20:30 - --	Vespera programo: Latinamerika vespero			

Horaro	Vendredo, 16an de julio, 2010		
	Konferenco	Seminario	
		INTK	Aktivuloj 1 / 2
08:00 - 09:00	Matenmanĝo		
09:00 - 09:15	Komuna Kunveno: tagaj informoj kaj ŝanĝoj		
09:15 - 09:30	SMG: La vojo antaŭen pri... konferencoj	Provlecionoj	
09:30 - 09:45			
09:45 - 10:00			
10:00 - 10:30			
10:30 - 10:45	Kafpaŭzo		
10:45 - 11:00	SMG: La vojo antaŭen pri... komunikado kaj organiziĝo	Provlecionoj	
11:00 - 11:15			
11:15 - 11:30			
11:30 - 11:45			
11:45 - 12:00			
12:00 - 12:15	Komitato: Kunsido 2 - konkludoj, proponoj por estonta agado	MEAG/PFR: La Hispana eksprese	Provlecionoj
12:15 - 12:30			
12:30 - 13:00			
13:00 - 15:00	Libera tempo		
15:00 - 15:15	Lingva festivalo en Matanzas	IK-taskoj: prezento kaj pridiskuto de la solvoj	
15:15 - 15:30			
15:30 - 15:45		Paŭzo	
15:45 - 16:00			
16:00 - 16:15		Pritakso de la seminario. Pluaj planoj	
16:15 - 16:30			
16:30 - 17:00		Libera tempo	
17:00 - 17:30			
17:45 - 18:00			
18:00 - 18:30			
18:30 - 19:00	Komuna kunveno: Tuttaga kaj tutkonferenca resumo		
19:00 - 20:30	Vespermanĝo		
20:30 - --	Vespera programo: Internacia kaj Adiaua vespero		

Sabato, 17an de julio, 2010:

08.00 Matenmanĝo (lasta konferenca manĝo)

09.00 Fermo

11.00 Ekiro de la buso al Havano.

Informoj pri prelegoj pri nia gastiga lando:

Julián Hernández Angulo. Licenciulo, universitata profesoro pri angla lingvo kaj laboras en la Universitata Pedagogia Instituto en Urbo Havano.

“Tra la Spuro de Esperanto-Leciono”. Temas pri analizo de esperantaj lecionoj surbaze de metodikaj kaj didaktikaj principoj. Foto: ĉe salutoj.

Maritza Gutiérrez González. Ĵurnalistino. “Kuba Alfabetiga Programo. Sociaj Sekvoj”. De multaj jaroj Kubo disvolvas proprajn alfabetigajn programojn kiel strategiero por plenumi la celojn je Edukado por ĉiuj. Dum la lastaj jaroj la alfabetiga metodo “Mi ja povas” kreita en la jaro 2000 de kubaj fakuloj, kaj uzata en dudeko da landoj el ĉiuj kontinentoj, estis agnoskita de Unesko per la internacia premio de edukado Reĝo Sejong en 2006. La nova sistemo faciligas solvon de universala problemo por tiuj landoj kun plej granda nombro da analfabetoj, tio estas, manko da instruantoj, eĉ por alfronti la elementan edukon. Jen kelkaj faktoj kaj perspektivoj evidentiĝas en la celo batali kontraŭ analfabetismo en regiono kiu serĉas propran evoluvojn kaj unuecon.



Juan Lázaro Besada Toledo. Universitata profesoro pri filozofio kaj laboras en la Universitato en Trinidad, provinco Sancti Spiritus. Pere de trarigardo al la ĉefaj historiaj, kulturaj kaj sciencaj personecoj kaj okazintaĵoj dum la komenco de la XIXa jarcento, la prelego situas la ekeston kaj elformighon de la kubaj kulturo kaj nacio.


Juan Ramón Rodríguez Gómez. Ĵurnalista. Revizoro en la Supra Tribunallo pri Justico en la tuta lando. “La faktoj parolas. Esperanto en Kubo 1904-1930” Tiu periodo markas ne nur startpunkton de la ekzisto de Eo en Kubo, sed ankaŭ disvolviĝo de tre intensa laboro por diskonigi la lingvon en la lando kaj krei klubojn, tutlandajn organizaĵojn, la unuajn gazetojn de nia historio kaj malfermi kursojn tra de la lando ĝis universitata nivelo, kie eĉ prezentiĝis doktora disertacio favora al Esperanto la 14an de Majo 1928.



Gonzalo Collantes García. Licenciulo pri Geografio. Pensiulo, loĝas en Santiago de Cuba, li estas instruisto de Esperanto. “Metodologio pri Eo ekde psikopedagogia vidpunkto”. La prelego celas transdoni liajn spertojn kiel instruisto el metodologia vidpunkto en- kaj ekster-lande.

Marta Eugenia Alonso Gutiérrez. Licenciulo kaj pensiulino.Ŝi kaj la teknikisto Pedro Fernández Rodríguez, kiu ankaŭ estas pensiulo gvidos hispanajn lecionojn por interesitoj.

(Pri ambaŭ vidu fotojn ĉe LKK).



Konferencaj aliĝintoj el eksterlando:

Charters, Duncan s-ro	Usono, Elsah
Montesinos de Gomis, Ana ino	Britio, London
Mynttinen, Synnöve s-ino	Finnlando, Lahti
Jerkovic, Marija s-ino	Kroatio, Zagreb
Latinović-Čaldarević, Jagoda s-ino	Kroatio, Zagreb
Nanic, Zlata s-ino	Kroatio, Zagreb
Opulskienė, Gražina s-ino	Litovio, Mažeikiai
Gabalda, Liba s-ino	Francio, La Norville
Gabalda, Floreal s-ro	Francio, La Norville
Collado, Antonio s-ro	Hispanujo, Betera
MacGill, Stefan s-ro	Hungario, Budapest
Petrović, Radojica s-ro	Serbio, Čačak
Bute, Aurora s-ino	Rumanio, Timisoara
Moerbeek, Robert s-ro	Nederlando, Beverwijk
Brankovic, Visnja s-ino	Kroatio, Osijek
Šemer, Josef s-ro	Israelo, Tel-Avivo
Emanuelsson, Agneta s-ino	Svedio, Katrineholm
Grossmann, Masako s-ino	Francio, Baldersheim
Grossmann, André s-ro	Francio, Baldersheim
Green, Hazel s-ino	Aŭstralio, Oakey
Green, Paul s-ro	Aŭstralio, Oakey
Smits, Simon s-ro	Nederlando, 's-Heerenhoek
Schmidt, Andrea s-ino	Germanio, Leipzig
Colling, Ivan s-ro	Brazilo, Curitiba
Moraes, Rita s-ino	Brazilo, Curitiba
Miró, Leysester s-ro	Brazilo, São Paulo

Seminariaj partoprenontoj

Despradel Hernández, Rafael s-ro	Dominika Respubliko, St. Domingo
Díaz Ríos, Leandra Fany s-ino	Bolivio, La Paz
Esquivel, Maria Eliette s-ino	Nikaragvo, Managua
Franco Pérez, Ulises s-ro	Meksiko, Guadalajara
Gonzalez Alvarez, Sara s-ino	Meksiko, Guadalajara
Ibarías Quezada, Maria Edith s-ino	Meksiko, Texcoco
Jiménez Rendón, José Gabriel s-ro	Meksiko, Tulancingo
Legault, Boris-Antoine s-ro	Kanado, Gatineau
Lopez Borja, Edgar Noel s-ro	Meksiko, Guadalajara
López Rueda, David s-ro	Meksiko, San Luis Potosí
Martinez Mateos, Mallely s-ino	Meksiko, Tecámac
Martinez Mateos, Morayma s-ino	Meksiko, Tecámac
Martinez Santullo, Ana Maria s-ino	Urugvajo, Montevideo
Muñoz Bonilla, Gilda s-ino	Meksiko, Tijuana
Nys, Anneleen	Belgio
Risso, Sonia s-ino	Urugvajo, Montevideo
Schaeffer, Martin s-ro	Meksiko, Tecámac
Sombra Argüelles, Victor Iván s-ro	Meksiko, Urbo de Meksiko
Theano, Christine s-ino	Haitio, Port-au-Prince
Zebrowski, Lukasz	Pollando, Varsovio

Enlandaj konferencanoj

Julián Hernández Angulo
 Maritza Gutiérrez González
 Juan Lázaro Besada Toledo
 Juan Ramón Rodríguez Gómez
 Gonzalo Collantes García
 Marta Eugenia Alonso Gutiérrez
 Pedro Fernández Rodríguez
 Carlos Ernesto Hernández Montes de Oca
 Héctor Jiménez Batista

Povos esti pliaj kubaj kolegoj. Pro la premaj preparlaboroj por la Universala Kongreso, pluraj el ĉi tiuj personoj povos nur parttempe partopreni.

Preparoj por la diskutsesioj:

Estas tempo senpacientiĝi pri la nuna stato de ILEI kaj koncepti kia devas esti la ligo por havi ŝancojn plenumi ĝiajn statuatajn kaj ceterajn celojn.

La vojo antaŭen pri laborfortoj

Nia unua jaro evidentigis ke la plej akuta demando por ILEI estas trovi pli da laborfortoj; tio fariĝas prioritato antaŭ ĉiuj aliaj, ĉar sen tio ĉiuj aliaj planoj postrestos aŭ ne realiĝos.

La demando havas du aspektojn: unue ILEI mem devas trovi kaj honorarii staĝulon aŭ alispecan helpanton (planate ekde la komenco de 2011) kaj trovi rimedojn tion daŭre fari. Tiu plenumo la svarmon da internaciaj ligaj taskoj kiujn la estraranoj kaj komisiitoj ne sukcesas atingi. Se iu dubas pri la bezono, legu la liston de taskoj sen plenumantoj, sur sekva paĝo.

La alia aspekto estas la celo de la tuta movado, ke oni altigu la kvaliton kaj kvanton de E-instruado. Tiu celo havas elstaran rolon en la finiĝanta Strategia Plano de UEA. Tiu laŭdinda dokumento elstarigis la celon, sed apenaŭ antaŭmetis konkretajn projektojn per kiuj atingi la celon, des malpli ĝi identigis la homfortojn kaj financajn rimedojn por ebligi tiujn projektojn. Ni devas timi ke la nova Plano falos en la saman kaptilon. Estas nia tasko forte kaj ripete alparoli la movadon, ke ili entuziasmu pri la celo, agnosku ke la rolo de ILEI estas provizi la fakajn lertojn (instrusta trejnado, lerniloj ks.), sed neniu imagu ke la eta ILEI prizorgos ĝian tutan organizadon, kaj eĉ malpli, ke la kompatindaj instruistoj financu tion. IFEF-anoj, MEL-anoj, UMEA-anoj kotizas por ke la faka asocio liveru servojn al la E-istaj fervojistoj, muzikistoj kaj kuracistoj. Neniu atendas de ili, ke ili prizorgu kaj financu la esperantistigon de ĉiuj trajnpasaĝeroj, koncert-aŭskultantoj aŭ pacientoj. ILEI inter la fakaj asocioj estas unika, kaj ni postrestas proklami tion.

ILEI devintus preni gvidan rolon en la laborgrupo pri la nova Strategia Plano de UEA. Ĝi devintus sendi artikolojn al revuo *Esperanto*, al diskutlistoj, Landaj Asocioj de UEA. Ke ĝi ne sukcesis tion en la pasinta jaro nur fortigas la aserton pri nia kritika manko de laborfortoj. Sekvajare, pli bone. La konkreta strebenda celo estas ke ene de la mandato de la nova estraro de UEA (2010-2013), UEA tasku unu oficiston aŭ voluntulon pri kunordigo de la agado sur la kampoj, kiujn la nova Strategia Plano proklamis prioritata – kiu esperegeble inkluzivos la instruadon. Finiĝu la epoko kiam ĉiuj oficistoj laboras preskaŭ ekskluzive por liveri servojn al membroj aŭ plenumi internajn administrajn taskojn. La voluntulo de TEJO donas bonan modelon – ekestu voluntulo pri cel-plenumado.

Diskut-demandoj: Kiel plekti sekciojn en internacian laboron? Kiel trovi bonajn staĝ-kandidatojn? Kiel trejni novan fortojn? Kiel liveri niajn mesaĝojn pli efike al la movado?

La vojo antaŭen pri komunikado kaj organiziĝo

Multilate ILEI vivas en la dudeka jarcento – kelkfoje eĉ la dek naŭa venas en la menson. Nia Statuto kaj regularoj klare naskiĝis en antaŭkomputila epoko kaj bezonas ĝisdatigon. Ni bezonas novan multlingvan retejon kiu turnas sin al la tuta movado, kaj ekster ĝi. Ni devas konsenti kiel modernigi la funkciadon de la komitato, per reta disponigo de dokumentoj, diskutado kaj voĉdonado – potencie multe pli demokrata ol la nuna situacio. Ni devas starigi dokument-deponejojn por niaj aktivuloj, kaj plenigi ĝin per daŭre aktualigitaj listoj, per praktikaj proceduroj por ligaj taskoj, ofic-priskriboj kaj statut-regular-precizigoj, por forigi la bezonon ĉiam devi peti freŝajn versiojn de bazaj labordokumentoj. Pasinta estu la tempo kiam tiuj dokumentoj kuŝis nur ĉe unuopa oficulo. Tia transformo multe pli bone protektos nin kontraŭ perturboj kiam oficantoj estas ŝanĝitaj.

Diskut-demandoj: Kiel igi la komisionojn agi pli efike; nuntempe ĉefe temas pri agado de unuopuloj. Ĉu pli projekt-bazita laborado? Kiel liveri gvidadon – estraranoj estas jam inunditaj de propraj taskoj. Kiujn protektojn ni bezonas por elektronikigi la komitatatan laboron (vidu la proponatan regularon fine de ĉi tiu libro; ĝin traktos la komitato).

La vojon antaŭen pri konferencoj

Unua konstato estu ke ni ĉiam pli konferencos ekstereŭrope. Tio favoras la instruistojn en la gastiga kaj apudaj landoj, kaj la pli bonstataj membroj el aliaj mondpartoj, sed klare malfavoras malplibonstatajn malapudajn membrojn. La konkludo estas ke estonta pli forta, pli kontentiga ILEI, devas organizi aŭ subteni pli vastan gamon da renkontiĝoj, tiel ke pli granda proporcio de niaj membroj kaj subtenantoj povu partopreni en ili.

Dua konstato estu, ke ekstereŭropaj konferencoj bezonas fundamente alian aliron ol eŭropaj. Ni fidus ke ni lernis tiun lecionon por la nuna konferenco; ni eĉ ne provis devigi niajn eŭropajn ŝablonojn al ĉi tiu nuna konferenco, kiu espereble havos aŭtentikan latinamerikan karakteron.

Tria konstato estu, ke ekstereŭropa konferenco en lando kie ne okazas Universala Kongreso, bezonas ankoraŭ alian tute malsaman aliron, kun ege granda kaj frua organiza laboro, ĉar la defio konvinki homojn vojaĝi tien estas signifa, kiel ankaŭ organizi por ili praktike pageblajn vojaĝeblojn. Se iam ajn ILEI planas fari similan aŭdacaĵon (kaj verŝajne temos denove pri Afriko) la planado devas komenciĝi pli ol du plenajn jarojn antaŭe kaj esti ege pli intensa ol por pli tradiciaj konferencoj.

Ni bezonas klarajn gvidilojn por la organizado de ĉiuj tri konferencotipoj. Pli koncizaj kaj praktikaj ol tiuj kiuj iam ekzistis.

Diskut-demandoj: Kion vi atendas de niaj konferencoj? Kion vi ŝatas pri ili, kion ne? Kiaj estu estontaj konferencotrajtoj. Ĉu la ekvilibro inter la faka, organiza kaj distra flankoj estas laŭ vi en ordo?

Taskoj sen plenumantoj

Jen malkompleta listigo de taskoj kaj projektoj kiujn ILEI volus entrepreni, sed povos fari nur kiam novaj helpantoj kaj kunlaborantoj estos trovitaj. Limigitaj laborfortoj estas la plej drasta problemo kiun frontas la Ligo. Ĉiu tiu listo provizas menuon, kaze ke ILEI sukcesos realigi sian planon honorarii helpanton. Sed ĉiam restos loko por unuopuloj, kiuj akceptos prizorgi unuopajn taskojn. La ordo ne sekvas skemon:

1. Refunkciigi la scienca komitaton de IPR - difini pli klare ĝian taskaron, administri la taskojn kaj plenumojn.
2. Teni niajn retadresajn kolektojn ĝisdatajn kaj kompili novajn listojn.
3. Aktualigi niajn retpaĝojn, kontroli eksterajn ligojn, krei retejan mapon aŭ indekson.
4. Kunlabori en laborgrupo por krei retpaĝaron laŭ pli modernaj ebloj (se eksperta tiutere), kiu havu mult-lingvan kapablon kaj prezentu nin al la ekstero, kaj kiu havu bonajn plurlingvajn ŝlosilvortojn, por ke ĝi figuru en serĉlistoj.
5. Transvarbado inter la membro-listo de ILEI kaj la abonlisto de Juna amiko.
6. Rektaj komunikoj al membroj (kie sekciestro ne plusendas niajn mesaĝojn, la membroj diras ke ILEI malaperis por ili)
7. Arigo de pli da varbo-materialo por ampleksigi la retejan oferton.
8. Prizorgo de rektaj informoj al konferencaj aliĝintoj, kunlabore kun LKK.
9. Prizorgi artikolojn pri ILEI kaj E-instruado kaj eksperimentoj en Wikipedia.
10. Starigi vizaĝojn de ILEI en Ipernity, FaceBook, Twitter, kaj pliaj sociaj retejoj.
11. Liveri sekretariajn aŭ gvidajn servojn al niaj komisionoj.
12. Rekta kontaktado kun ne-realiĝintaj membroj, interkonsente kun sekciestro.
13. Administra subteno al la konkurso por stipendiaj lokoj che UAM - korespondado kun kandidatoj ks.
14. Helpo en pretigo de simpoziaj kajeroj - aktuala por Kopenhago. Kontaktado kun aŭtoroj aŭ redaktado.
15. Serĉado de subvenciebloj por transnaciaj projektoj, trovo de partneroj, peto-pretigo, livero de organizaj fortoj al tiuj projektoj.
16. Prizorgo de rilatoj kun FIPLV - nun 98% neglektata. Bezonas scion de la angla.
17. Intensigo de rilatoj kun aliaj asocioj, ekz. UNEP (hommedio), UNICEF (infanoj), UNESKO, ALTE...
18. Kreo de retaj aliĝiloj (se komputike lerta), por konferencoj kaj aliaj celoj.
19. Pretigo de salutoj de ILEI por diversaj E- kaj neE-renkontiĝoj.
20. Prizorgo de niaj libroservaj stoko kaj vendoj, kunlabore kun nia kasisto.
21. Prizorgo de kampanjoj revivigi dormantajn sekciojn.
22. Liveri administrajn servojn al provoj starigi novajn sekciojn.
23. Diskonigi pli vaste eblojn ekzameniĝi; ĉu ĉe ILEI, ĉu ĉe ITK/KER.

24. Administri estrarajn voĉdonojn (la sekretario administru la komitatajn).
25. Arigu retadresojn de E-gazetoj, radio-stacioj, ret-gazetoj, listo-prizorgantoj, por ke ni pli facile diskonigu niajn komunikojn ekster niaj propraj rondoj.
26. Administri konkursojn en Juna amiko, ĝisdatigu la retajn vizaĝojn de Juna amiko (precipe ĉe <lernu.net>)
27. Pretigu plurlingvan kalendaron de niaj eventoj (ankaŭ tiuj de niaj sekcioj), por livero al niaj ekstermovadaj partneroj.
- 28-50+. Verkendaj.



Bildo de Torpedo 5 en oktobro 2009. Vidu la raporton pri edukcentroj poste en la libro. Tio kombinis aranĝon de la germana ILEI-sekcio kun transnacia instruisto-trejna projekto kiu estis ebligita pere de ekstera subvencio. Kun pli da laborfortoj, ILEI povus pretigi pli da tiaj projektoj, tiel ke ili atingu niajn celojn sen dolorigi nian financon staton.

Tago de la Lernejo

20.07.2010, 10-16 h, 95-a UK, Havano (kunordiganto: Aurora Bute)

Temo: *La plezuro de lernado kaj instruado*

I. Malfermo: 10 – 10.15

Enkondukaj vortoj (Aurora BUTE, ILEI-komitatano)

Saluto nome de ILEI (Stefan MacGILL, prezidanto de ILEI)

Saluto nome de UEA (Claude NOURMONT, ĝisnuna estrarano de UEA, UEA-observanto ĉe ILEI)

Saluto nome de la Kuba Sekcio de ILEI (Julián HERNÁNDEZ ANGULO),

II. La unua serio de prelegoj (ludoj)

1. **Ebloj de rol-ludado** (Stefan MacGILL, prezidanto de ILEI) (10.15-10.35)
2. **Interkulturaj lingvaj ludoj** (Mag. Radojica PETROVIĆ, estrarano de ILEI) (10.35-10.55)
3. **Kartludo por instrui lingvan diversecon** (D-ro François LO JACOMO, prezidanto de Kulturdomo de Esperanto-Kastelo Greziljono) (10.55-11.15)
4. **Plezure legi tekstojn en duagradaj kursoj kaj lerni!** (Prof. D-ro Renato CORSETTI, prezidanto de Itala Esperanto-Federacio) (11.15-11.45)
5. **Programeroj por lecionoj por progresantoj** (Josef SHEMER, Sekretario de Esperanto-Ligo en Israelo) (11.45-12.15)

III. La dua serio de prelegoj (instruado)

6. **Laŭŝtupaj ekzercoj por parolkapabligi lernantojn** (Prof. Julián HERNÁNDEZ ANGULO, prezidanto de Kuba Esperanto-Asocio) (12.15-12.35)
 7. **La rektmetoda instruado kaj metodikaj helpiloj** (Stano MARČEK, redaktoro de la revuo Esperanto, prezidanto de Slovaka Esperanto-Federacio) (12.35-12.55)
 8. **Spertoj en la instruado de Esperanto en Brazilo kaj en Kubo** (Gonzalo COLLANTES) (12.55-13.15)
- Paŭzo (13.15-13.25)
9. **La Esperanto-Sumoo** (HORI, Yasuo, estrarano de Japania Esperanto-Instituto, ĝisnuna estrarano de UEA) (13.25-13.40)
 10. **Lingva talento, profesia kompetenteco, motivado kaj ties influo sur la E-lingvo instruado. Personaj travivaĵoj** (Héctor Jiménez Batista, E-instruisto) (13.40-13.55)
 11. **Senseĝa instruado** (Sylvain LELARGE, kunlaboranto de www.edukado.net) (13.55- 14.25)
 12. **Gravaj novaĵoj ĉe edukado.net** (D-rino Katalin KOVÁTS, redaktoro de www.edukado.net) (14.25-14.55)

IV. La tria serio de prelegoj (projektoj)

13. La projekto de Peni Vos, **"Parolante al la tuta vasta mondo"** (Jennifer BISHOP, direktoro de edukado por Aŭstralia Esperanto Asocio) (14.55-15.15)
14. Lernu.net kaj la E-instruado (Radojica PETROVIĆ, estrarano de ILEI) (15.15-15.35)
15. Brilaj projektoj britaj: du projektoj lanĉitaj kaj organizitaj de britoj montras ke en Britio Esperanto bele burĝonas (D-ro Geoffrey GREATREX, estrarano de EAB, nome de Angela Tellier, kunordiganto de la projektoj Lingvolanĉilo kaj Komenio) (15.35-15.55)
16. FRINGOJ 2011, niaj lernantoj estas artistoj ! (Elizabet BARBAY, edukistino, lanĉinto de la Festa Renkonto Internacia de Geknaboj en 2006) (15.55-16.00)

V. Fermaj vortoj: Stefan MacGILL



"Ebloj de Rolludado". Sceno el vigla rolludo dum Torpedo 4, kie la kursanoj ne nur plenumis rolludon, sed ricevis la taskon en du grupoj verki proprajn rolludojn, kaj poste realigi ilin pere de la anoj de la alia grupo.



ILEI kunlabore kun la Universitato Adam Mickiewicz en Poznań, Pollando realigas grandan parton de nia instruisto-trejna programo. Gvidanto Katalin KOVÁTS (TdL-prezentanto) prezentas al studentoj dokumentojn pri la vivo de pioniro Andreo CSEH. Inter la studentoj troviĝas kvar stipendiitoj de UEA/ILEI en ekzemplodona kunlaboro. Tiu stipendia programo ripetigis por la studjaro kiu komenciĝis en septembro 2010.

Estrara Raporto pri la jaro 2009

1.1 Estraro

La nuntempa Estraro estis elektita la 22an de julio 2009 en la komitatkunsido dum la 42a ILEI-Konferenco en Krakovo, kun mandato por 2009-2012:

Stefan MACGILL – prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj, eldonaĵoj)
Duncan CHARTERS – vic-prezidanto (universitata kaj scienca agado)
Małgosia KOMARNICKA – sekretario (rilatoj kun sekcioj kaj membroj)
Juliĵa BATRAKOVA – kasisto (financoj, membro-administrado)
Radojica PETROVIĆ – membro (edukprojektoj, informado)
Zsófia KÓRÓDY – membro (E-centroj, instrkapabligado, ekzamenoj)
Julian HERNANDEZ – membro (landa kaj lerneja agado)

La ILEI Estraro deziras apliki maksimuman malfermitecon en ligaj aferoj. Ni rete publikigas ĉiujn dokumentojn kiuj povas interesi la membraron aŭ la esperantistaron. Plia deklarita celo estas intensigi la kontaktojn kun la sekcioj kaj iliaj komitatoj, tiel ke ili fariĝu ĉiam pli tutjara kaj demokrata organo. La reto permesas al ni intensigi interkompreniĝadon kaj antaŭ ĉio partoprenigi multe pli da komitatoj ol dum niajn konferencojn. Ni iniciatis ankaŭ retan voĉdonadon. La Estraro kunsidis inter 27-30 de novembro 2009 en Roterdamo ĉirkaŭ la Malferma Tago de la Centra Oficejo, kie ĝi sukcese prezentis la Ligon.

1.2 Sidejo

La sidejo de la Ligo estis en novembro ŝanĝita de la oficejo de IEI en Hago al la Centra oficejo de UEA en Roterdamo. Tiu adreso ja ne uzindas por korespondado kun ILEI, ĝi havas signifon nur por la jura registriĝo de las Ligo:

Jura sidejo de ILEI: Nwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

1.3 Celoj

Ĉefaj celoj de ILEI por la periodo 2009-2012, akceptitaj en Krakovo:

- Altigi la kapablojn de la esperantista instruistaro diskonigi novajn teknikojn, organizi fakajn seminariojn...
- Akceli la universitatan agadon
E-kursoj, projektoj, instrukapabligo, programoj UPN, UAM, AIS...
- Organizati, stimuli kaj katalogi la instruadon de Esperanto kunlabori kun ekzistantaj fortoj agantaj tiukampe

- Fortigi la instruistan trejnadon kunlabori kun ekzistantaj fortoj, evoluigi ligan programon
- Subteni kaj realigi interkulturajn projektojn
Interkulturo, Flugiloj, IĈLM, Indigenaj Dialogoj, Comenius, AKEL...
- Starigi kaj subteni ret-kursojn
emfazi eblojn arigi retlernantojn en fizikajn renkontiĝojn
- Kunroli en informaj kampanjoj prepare al kursoj:
lingvaj festivaloj, evoluigo de gvidiloj kiel anonci kaj okazigi kursojn
- Fortigi la eksterajn rilatojn: UNESKO, FIPLV, ISAE, UMEA...
- Disvastigi la ILEI-agadon en ĉiuj kontinentoj:
projektoj, instruado, fondo kaj fortigo de sekcioj...
- Reekzameni ekzamenojn
rilati pli pozitive al la KER-ekzamenoj (UEA-ITK), klarigi kiel KER kaj la UEA/ILEI sistemo povas funkcii paralele kaj kial indas reteni ambaŭ.
- Pritaksi kaj katalogi lernilojn

1.4 Komisionoj

1.4.1 Ekzamena (2009-2012)

- Mireille GROSJEAN, Svislando, prezidanto
- Monika MOLNAR, Svislando-Hungario, vicprezidanto
- Reza TORABI, Irano, sekretario
- Karine ARAKELIAN, Armenio
- Giridhar RAO, Barato
- Jeremie SABIYUMVA, Burundo
- Han ZUWU, Ĉinio

La Internacia Rajtigita Ekzamenantaro nun havas 111 membrojn el 40 landoj kaj ĉiuj kontinentoj. Tri sesioj estis planitaj por 2009, sed tiuj en la ILEI-konferenco kaj la UK el Bialistoko estis nuligitaj pro manko de kandidatoj. Sesio okazis en Lomé, Togo en decembro 2009, kie 16 personoj kandidatiĝis, 10 elemente kaj 6 meze. En la elementa nivelo 3 malsukcesis en la gramatika testo kaj 6 en la skriba parto. Sukcesis Kede Gadji Kokou. Meze, falis 5 en la skriba parto; sukcesis Ouro Agoro Tchaticpi. Vidu pli detalan raporton anekse.

1.4.2 Elekta (2006-...)

- Tiekio Isikawa, Japanio
- Ana Montesinos de Gomis, Britio
- Aurora Bute, Rumanio (gvidanto)

La komisiono celtrafe kaj intense laboris por pretigi novajn kandidatojn por la konferenco en Krakovo.

1.4.3 Kontrola (2006-...)

- Ulla Luin , Svedio
- Simon Smits, Nederlando
- Rudi Koot, Nederlando

Du nederlandaj revizoroj estis nomumitaj en Krakovo, pro la transigo de la plimulto de la kontumado al tiu lando. Pro ĝisnuna manko de finkalkulo de la Krakova konferenco, la revizoroj ne povis komenci sian laboron pri kontoj 2009.

1.4.4 Regulara

- Marija Belošević, Kroatio
- Rob Moerbeek, Nederlando
- Atilio Orellana Rojas, Nederlando

La Komitato kaj Estraro ne direktis al la komisiono konkretajn taskojn, do ne venis raporto.

1.4.5 Terminara

- Maŭro La Torre, Italio †(gvidinto)
- Ilona Koutny, Pollando
- Miroslav Malovec, Ĉeĥio.

Miroslav Malovec kolektis multajn vortojn el la pedagogia fako, kiuj troviĝas ĉe: <http://www.volny.cz/malovec/tematika.html>

Ilona Koutny eldonis serion da plurlingvaj fakaj terminaroj, inkluzive de volumo pri instruado. Necesas elekti novan gvidanton por la komisiono.

1.4.6 Lerneja

- Carola Antskog, Finnlando (gvidanto)
- Luigia Madella , Italio
- Ermanno Tarracchini, Italio
- Mihai Trifoi, Rumanio
- Jennifer Bishop, Aŭstralio
- Ronald Glossop, Usono
- Julian Hernandez, Kubo
- Tieko Isikawa, Japanio
- Marija Jerković, Kroatio
- Jacqueline Poux, Francio

Ne alvenis raporto.

1.4.7 Universitata

- Duncan Charters, Usono (gvidanto)
- Ilona Koutny, Pollando
- Renato Corsetti, Italio
- Kristin Tytgat, Belgio
- Aida Čižikaite, Litovio
- Radojica Petrović, Serbio

En la laboro de la Universitata Komisiono ĉefrolis dum la pasinta jaro Radojica Petrovic, komisiita de la estraro de ILEI prilabori la organizadon de universitat-nivela simpozio en Kopenhago okazonta inter la konferenco de ILEI kaj la UK en 2011. Tiu simpozio ebligis al ILEI ludi kernan rolon en la antaŭenigo de serioza pristudo kaj pridiskuto de temoj tuŝantaj la kuntekston de transnacia komunikado, kaj la rolo de Esperanto kaj ĝia instruado en lingva kaj kultura edukado. Jam eldoniĝis kontribuaĵoj al la simpozio okazinta en Pollando, kaj ILEI organizas publikigon de referaĵoj kaj prezentaĵoj de antaŭaj simpozioj, precipe tiun de Parma. La Komisiono celas subteni jam ekzistantajn programojn kiel tiun de UAM en Pollando, havas apartan intereson subteni universitat-nivelan instrutreinadon, kaj celas kunlabori kun AIS kaj aliaj subtenantoj de serioza universitata laboro, inkluzive ESF kaj aliaj fondaĵoj kaj institucioj. ILEI deziras kunlabori kiuj ĉiuj kiuj povos subteni la laboron, kaj havas apartan intereson pri la plifortigo de la universitata agado por Esperanto per kunlaborado de fakultatanoj, subteno de financataj projektoj, kaj eldonado. (DC)

2. Sekcioj kaj Membraro

En la jaro 2009 ILEI havis 32 sekciojn en 32 landoj (unu lando havas du sekciojn, aliloke du landoj havas komunan sektion) kun sume 674 anoncitaj membroj laŭ la raporto prezentita al la konferenco en Krakovo. Detalojn vi trovos en *Raportoj de Landaj Sekcioj por 2009*.

Pri 2009 raportis 23 sekcioj, do plenumo de 82%.

Tiuj raportoj estas tre gravaj kaj tial la ILEI-estraro akceptis la taskon publikigi ilin en ĉi tiu formo en sia paĝaro. La unua tia raporto pri 2008 aperis en septembro 2009, tiu pri 2009 en majo 2010. Por faciligi la reagemon ni proponis por 2009 uzon de normigita raport-folio, kiu montriĝis utila. Plejparte la raportoj venis en tiu iom normigita formo, kaj vi povas mem konstati, ke la kompilita raporto pro tio estas pli kohera, kaj ebligas diversajn analizojn.

Malgraŭ statuta devigo kaj ripetaj petoj la sekvaj sekcioj ne sendis sian jarraporton el Belgio, Benino, Burundio, Ĉeĥio, Danlando, Koration (KEL kaj

KEU), Norvegio kaj Svedio. La kroata – KEL kaj la danlanda sekcioj sendis la membrolistojn, ceteraj bedaŭrinde eĉ tion ne plenumis.

Pro tio, la membraro fine de 2009 similis al tiu de la antaŭjara. Por 2010 ni notas modestan kreskon, sed el la preskaŭ 700 membroj, pli ol 250 estas retaj membroj, kiu montras senteban kreskon kompare kun 2009. Laŭ la interna regularo, sekcio kiu ne deklaras membrojn ĝis la 31a de marto aŭ sendas jarraporton estas 'konsiderata kiel ekzistinta'. Se ni aplikus rigore tiun principon pri 2009 kaj 2010, ILEI nun havus nur 21 sekciojn. Kelkaj sekcioj ne sendis al la sekretario de ILEI membroliston kaŭzante, ke la membroj de la sekcio ne ricevas la pagitan revuon - IPR. La manko de laborfortoj en ILEI kaŭzis ke la koleghelpaj membriĝoj estis malfrue deciditaj kaj realigitaj.

Naŭ sekcioj notis pligrandigon de la membraro. Ili estas: brazila, ĉina, hungara, japana, korea, kroata (KEL), pola, svisa kaj ukraina. Vidu laŭlandan statistikon fine de la raporto.

Kun ĝojo ni povas substreki, ke estas kelkaj (bedaŭrinde nur kelkaj) sekcioj kiuj perfekte kunlaboras. Ili tuj reagis je ĉiuj demandoj aŭ petoj. Ni esperas, ke ilia nombro kreskos. Necesas tamen ankoraŭ plifortigo de la sekciaj laboroj kaj ilia kunlaboro kun la Ligo.

3. Financoj

Vidu apartajn dokumentojn pri kontoj 2009.

ILEI malfermis novan konton en nederlando, la loĝlando de la kasisto:

ING Bank N.V.; kontonumero: 4676855;

IBAN: NL55INGB0004676855; BIC: INGBNL2A

4. Konferencoj

La 42a Konferenco de ILEI okazis en Krakovo, Pollando inter la 17a kaj la 25a de julio 2010. La temo de la konferenco estis: *La pedagogio de Esperanto antaŭ la defioj de interkultura komunikado*. En ĝi partoprenis pli ol 75 instruistojn kaj edukajn aktivulojn, farinte tion per rekorde bunta kaj plena programo de seminarioj, prelegoj, prezentaĵoj kaj ekskursoj.

Dum la konferenca ĵaŭdo, okazis tuttaga Simpozio, kiu arigis fakulojn el kvar da polaj kolegioj kaj universitatoj iel ligitaj al lingvo-instruado. Unu el la celoj de konferencaj simpozioj estis ebligi kunvenon kaj kunlaboron de esperantistaj sciencistoj kun neesperantistaj sciencistoj de loka medio. Tiucele estis proponataj minimume du laborlingvoj: Esperanto kaj la oficiala lingvo de la

gastiganta lando (kompreneble, kun tradukoj) – ĉi-foje la pola. Ĉi tiu Simpozio montris, ke en Pollando oni povas trovi sciencistojn, kiuj konas Esperanton, aŭ almenaŭ apogas la agadon por Esperanto.

En la konferenco estis elektita nova Estraro kiu tuj pretigis por komitata aprobo celaron 2009-2012 kaj buĝeton 2010. Ĝi starigis novan komisionon pri la universitata kaj scienca laboro, sub gvido de la nova vic-prezidanto Duncan Charters. La nova estraro dankis al la antaŭa pro ĝia laboro 2006-2009.

La fermo enhavis kortuŝan kaj novan ideon: aldone al la kutimaj dankoj kaj donacetoj, ĉiu plentempa konferenca partopreninto ricevis (kun kisoj, brakumoj kaj eĉ unu/du preskaŭ kaŝitaj larmetoj) belan atestilon pri la partopreno, autentigita per vaksa sigelo kun emblemoj de la konferenco kaj de ILEI.

La plimulto de la konferencanoj pluiris al UK, kie ILEI abunde reprezentigis, en sia propra kunsido, ĉe ILEI-budo, en la Movada Forio, en la UEA-komitato kaj kompreneble en la Tago de la Lernejo.

Dum la ILEI-Konferenco en Krakovo la estraro de la pola sekcio de ILEI promesis eldoni ĝis la fino de 2009 specialan kajeron kun prelegoj, kiujn oni aŭdigis dum la konferenco. La estraro de la pola sekcio trovis la sponsoron, dank' al kiu oni povis tiel rapide efektiviĝi promeson, sed ankaŭ dissendi *Sciencajn Kajerojn* al la aŭtoroj de la prelegoj kaj al la tradukintoj.

La materialo, post plia redaktado estos rete disponigita kaj fizike presita en malgranda eldonkvanto.

5. Eldonaĵoj

ILEI regule eldonas du revuojn: *IPR* kaj *Juna Amiko*.

Internacia Pedagogia Revuo (IPR) prezentas instru-fakajn artikolojn, edukajn novaĵojn, recenzojn de lernolibroj kaj de alispecaj lerno-materialoj kaj organizajn informojn. Ĉiujare aperas 4 numeroj. Ĝia redakta komitato estas Jozsef NEMETH (ĉefredaktoro), Rob MOERBEEK, Luiza CAROL kaj Luigia OBERRAUCH MADELLA, kiuj ĉiam provlegas ĉiun numeron.

Ĝi krome havas sciencajn komitaton, kiu prijuĝas la fakajn artikolojn.



Juna Amiko celas precipe tiujn, kiuj jam konas la fundamenton de Esperanto, scias la bazajn gramatikajn regulojn, sed ne trovas legaĵojn en Esperanto kiel eble facila, ĉar la revuo uzas la plej oftajn 1500 radikojn. La revuo aperas 3-fojojn jare (aprilo, septembro, decembro). Vidu apartan raporton.

6. Informado

La adreso de hejmpaĝo de ILEI estas. www.ilei.info Ĝi estas regule ĝisdatigata. La ligo mastrumas diskut-listojn por la sekcistoj kaj la komitatanoj, krome la listo **e-ins** (e-ins@yahoo.groups) por fakaj diskutoj; ĝi kunlaboras kun eduk-rilataj listoj sub prizorgo de aliaj (ekz. Esperanto-en-lernejojn) kaj kun retejoj kiel **edukado.net** kaj **lernu.net**.

7. Rilatoj kun aliaj instancoj

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.uea.org. Observanto de ILEI ĉe UEA: Stefan MacGill. A-komitatano el ILEI ekde Kubo: Stefan MacGill. Observanto de UEA ĉe ILEI: Claude Nourmont. La du observantoj ĉeestis parte aŭ tute la estar-kunsidon de la alia.

- TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: Radojica Petrović. Observanto de TEJO ĉe ILEI: Gregor Hinker.

- UNESCO (en neformalaj rilatoj): Reprezentantoj de ILEI: Francois Lo Jacomo, 72, quai de la Loire, FR-75019 Paris, francois.lojacomo@wanadoo.fr Monique Arnaud, Ecole Chemin de l'Esperanto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr Jean-Pierre Boulet, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60

8. Niaj Partneroj

ILEI kunlaboras kun kelkaj instancoj kaj projektoj.



Edukado.net <http://www.edukado.net/>
Bunta fonto de plej diversaj edukaj helpiloj kaj informoj.



Lernu.net www.lernu.net
Multlingva paĝaro por senpage lerni Esperanton.

E@I (Edukado-che-Interreto) <http://www.ikso.net/eo/> Junulara organizo kies retejo prezentas sin en 32 lingvoj.



ALIE esperanto-en-lernejojn@googlegroups.com



Internacia Laborgrupo ALIE (*Internacia Laborgrupo por Antaŭenigi la Lernejan Instruadon de Esperanto*) kunlaboras kun instruistoj kaj instruantoj de Esperanto kun aliaj fakuloj.



Springboard www.springboard2languages.org

Ampleksa projekto en Britio por enkonduki Esperanton en lernejojn surbaze de ĝia propedeutika valoro, argumentante ke studado de Esperanto repagas la investon per ĝia kontribuo al pli facila lernado de aliaj lingvoj.

AKEL

AKEL estas la Esperantlingva laborgrupo kadre de la *Europa programo pri Vivlonga Lernada Procezo* (LLP) *LifeLong Learning Program* (2007-2013), kiu funkcias pere de sub-programoj *Comenius* (por elementaj kaj mez-lernejoj), *Erasmus* (por universitatoj), *Leonardo da Vinci* (por metiejoj) kaj *Gruntvig* (pluedukado por plenkreskuloj).

UAM (Universitato Adam Mickiewicz en Poznań, Pollando).
<http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>



UAM okazigas oficialajn tri-jarajn kursojn en Interlingvistiko, kaj plie unujarajn kursojn de instruista trejnado. Tiuj kursoj estas funkciigataj kunlabore kun ILEI kiu organizas kelkajn stipendiojn por partoprenantoj kiuj intencas poste aktive instrui Esperanton.

FIPLV <http://www.fiplv.org/> (paĝo ĉefe en la angla)

Federacion Internationale de Professeurs de Langues Vivante – Federacio Internacia de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj estas neregistara organizo kun rilatoj kun Unesko kaj (inter multaj aliaj) la Modernlingva Asocio de Usono.



ILEI havas regulajn kontaktojn kun FILPV, kies sidejo estas en Graz, Austrio. Tiun statuson konfirmas la anglalingva dokumento ce:

<http://www.fiplv.org/documents/profileEN06.pdf>.



ICH <http://ic-herzberg.de/>

Interkultura Centro Herzberg - trejnsejtoj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj.

- AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj, San Marino)

AIS estas universitatnivela kleriga kaj esplora institucio, kiu por scienca komunikado elektis la Internacian Lingvon de d-ro Esperanto.



- **Flugiloj de Malfacila Vento** <http://ikso.net/flugilo>



"Flugiloj de malfacila vento" (mallonge "flugiloj") estas projekto por plivastigi kaj subteni instruadon de Esperanto, ĉefe inter junuloj. La projekto celas interalie ellabori manlibron pri Esperanto-instruado kaj okazigi trejnseminariojn pri lingvoinstruado.

Okazis tri seminarioj de Flugiloj de Malfacila Vento en julio 2009:

- en Kinŝaso (vidu la sekvan paĝon, 15 sukcesintoj)
- dum SES en Modra-Harmonia, Slovakio (6 sukcesintoj)
- dum IJK en Liberec, Ĉeĥio (8 sukcesintoj)

En tiuj aktive enplektiĝis ILEI-anoj.

Kompilis
Małgosia Komarnicka
ILEI-Sekretario
11-12.06.2010

ILEI aktivis en Afriko en 2009

La seminario de ILEI okazinta en Kinŝaso komence de julio 2009 (25 progresintoj kaj 15 trejnitaj pri E-instruado) havas longdaŭrajn efikojn tie:

- Fondiĝis Sekcio de esperantistaj instruistoj de DR Kongo, kiu povas baldaŭ fariĝi Landa Sekcio de ILEI en DR Kongo.
- La revekita entuziasmo pri Esperanto efektiviĝas tra ĝia instruado en pluraj lokaj grupoj en diversaj partoj de Kinŝaso kaj najbara Lukalo.
- La eperantista grupo enkadre de la Nacia Pedagogia Universitato (UPN), kiu estis kerna por organizo de la seminario, plifirmigis la subtenon de la Universitato kaj plifortigis sian agadon tie.
- La Rektoro esprimis intereson pri kunlaboro kun ILEI por starigo de E-pedagogia fako ĉe UPN kaj, aliflanke, helpo de ILEI por havigi bezonatajn gastprofesorojn el Eŭropo al UPN, unuavice por komputiko kaj matematiko.
- La seminario kunigis grupon de muzikaj talentuloj kaj profesiaj muzikistoj kiuj partoprenis la klerigan programon kaj zorgis pri la distra programo. Ili daŭrigis sian kunagadon kaj, kelkajn monatojn poste, eldonis kun Vinilkosmo KD-on kun originalaj kaj adaptitaj kantoj en Esperanto en kiuj plaĉe kunfandiĝas la esperantistaj idearo kaj entuziasmo kun afrikaj sonoj kaj sopiroj. Ĝi servas por konigado de konga kulturo per Esperanto, pruvo de la praktika valoro kaj utileco de Esperanto, kaj fonto de enspezoj por la E-agado.
- ILEI kontaktiĝis kun fondintoj (IKUE kaj katolikaj mondonacintoj el Rimini, Italio) de Lerneja centro Anna Poalizi en Kinŝaso, esprimis sian subtenon al E-kurso komencita tie kaj promesis sendon de E-lernmaterialoj.
- Startis verkado de afrikecigita Junulkurso de Esperanto, tradukita en la lingvon Lingala.

[Aldono: La aranĝon partoprenis kaj kunorganizis la tiama prezidanto de ILEI.]

Sekvaj paŝoj, rilate al DR Kongo:

- Helpo en pretigo de aliĝpeto al ILEI, kaj formala agnosko de tiu sekcio.
- Sendo/sendado de E-lernmaterialoj el ne vendeblaj sed utiligeblaj libro- kaj revu-stokoj de ILEI.
- Projekto de E-pedagogia fako ĉe UPN. Malgraŭ komencaj pozitivaj reagoj de Renato Corsetti kaj Kristin Tytgat, ni ne sukcesis kolekti kaj motivigi E-universitatanojn por verki subvencipetan projekton ĝis la limdato fine de aprilo, kaj nia Komisiono pri universitata agado ne traktis ĝin. Plu provindas.
- Daŭrigo de laboro pri la lingallingva lernolibro

Rade

Instrukapablo kaj edukcentroj

1. Instrukapablo kun la ĝenerala celo: prizorgi trejnadon por spertaj, kvalifikitaj instruantoj, instruistoj.

Instruista trejnado: UAM/Poznan: ILEI kun UEA multe klopodis por sukcesigi la sekvan instruistan kurson en la universitato en Poznan (PL). Dank al la subvencioj nujara trejnkurso povis komenciĝi en septembro 2009, en novembro 2009 decido okazis pri alvokoj sendendaj al landaj asocioj por subvencii studemulojn kaj pri disponigo de ILEI-subvencio por subteni novajn kursanojn.

TORPEDO-5 (Pedagogiaj Tagoj) en Herzberg am Harz oktobro 2009: Enkadre de la Dumviva lernado programo de EU PEA, E@I kaj Interkultura Centro Herzberg (ICH) ellaboris 2-jaran Grundtvig projekton (2009-2011) por trejni Esperanto-kursgvidantojn en la universitato de la tria aĝo. Dum la trejnsukcesa trejnsemajno la partoprenantoj ricevis lingvan plibonigon, enkondukon en la E-movadon, trarigardon de instrumentoj kaj praktikajn spertojn pri instruado de Esperanto per la lernolibro de Stano Marcek: Esperanto per rekta metodo. La trejnado sekvis la novan sistemon de moduloj por instrukapabligado, ellaborita de Zsófia Kóródy laŭ komisiono de la ILEI-estraro 2006-2009 surbaze de jardeka sperto ricevita el organizado de studadsesioj de Germana Esperanto-Centro en Herzberg am Harz. Ĝi enhavas i.a. la sekvajn fakojn: metodiko, literaturo, historio, kulturo, varbado, movadaj konoj. Daŭras la projekto Flugiloj de malfacila vento por junaj instruantoj kaj instruistoj. Trejnseminario okazis en aŭgusto 2009 dum IJK en Szombathely (Hungario). Revigliĝis la instruista agado en Koreio kaj Ĉinio, kie okazis fruktodona kunveno de instruistoj el multaj partoj de tiu granda lando.

La spertiĝo de Esperanto-instruistoj servas ankaŭ la lernejaj projektoj, kiuj postulas la kunlaboron de lernejoj, gekolegoj el pluraj landoj. En 2009 bonajn sukcesojn atingis ene de la Dumviva lernado programo de EU la Comenius-projekto inter Britio (Springboard lernejo en Bar Hill) Germanio (bazlernejo en Herzberg am Harz) kaj lernejo en Miskolc, Hungario, komenciĝis nova Comenius-projekto inter Bulgario, Francio, Hungario kaj Pollando. Alia bela ekzemplo estas la same Comenius-projekto: Interkultura kaj multlingva dialogo helpe de la neŭtrala lingvo Esperanto inter la eŭropaj lernejoj. Partneroj: Hispanio, Italio, Portugalio.

2. Esperanto- kaj edukcentroj, kun la ĝenerala celo: kontaktoj, informado, spertinterŝanĝo, fortigo de kunlaboro

Krom la jam menciita UAM en Poznan, daŭras kunlaboro kun aliaj E-domoj, centroj (ekz. Esperanto-Domo en Budapeŝto, Afrika Oficejo de UEA en Benino):

interŝanĝo de informoj, spertoj, konsilado pri lernejaj kaj aliaj projektoj, personaj vizitoj ekz. laŭ la interkonsento pri longdaŭra staĝado inter Seula E-Centro kaj ILEI-partnero Interkultura Centro Herzberg (ICH), en kies biblioteko en 2009 ekestis pedagogia-metodika faklektaĵo. El la spertoj akiritaj per eŭropaj projektoj dum 2009 ICH iniciatis organizi ILEI-seminaron dum 2010 pri projektoj kaj subvencipetado.

3. Ekzamenoj:

Nun ekzistas du paralelaj ekzamensistemoj: la Internaciaj Ekzamenoj (IE) de ILEI-UEA kaj la KER-ITK, kiu allogis multe pli ol la tradicia sistemo. La komisiono okazigis 10 sesiojn en 4 landoj (Ĉeĥio, Germanio, Nederlando, Pollando) kun entute 17 kandidatoj por B1, 25 por B2 kaj 84 por C1. Pri la tradiciaj UEA-ILEI ekzamenoj legu la aldonan raporton de Mireille Grosjean, prezidanto de Internacia Ekzamena Komisiono.

Zsófia Kóródy, estrarano de ILEI,
respondeca pri ekzamenoj, ekzamena komisiono, Esperanto-centroj, instrukapablo.

Raporto pri Juna amiko 2009

La unua numero por 2009 aperis ĝustatempe en aprilo, sed la dua aperis ne en septembro sed en decembro kaj la tria ne en decembro sed en marto 2010. Tion kaŭzis la julia transformo de duono de la redaktora teamo en prezidanton de ILEI. Feliĉe, la maleblo kombini tiujn rolojn rapide konstateblis, tuj lanĉiĝis alvokoj restabili la situacion. Tio rezultis en la trovo de redaktoro-kandidato (Julianna Vas-Szegedi) kaj nova rubrikestro (Małgosia Komarnicka) kaj datumbaza prizorganto (Sebastian Cryptych) kiu povos fariĝi la administranto. Tra la tuto, la revuo konservis sian alt-nivelan enhavon; la abonantaro en 2009 konservis similan nivelon kiel en 2008, kun ĉ. 650 pagintoj. Same, tra la tuto, gravas agnoski la ŝlosilan kaj stabiligan rolon de la redaktoro Geza Kurucz.

Perspektivoj por 2010

Unue, la nova redaktora strukturo komencas efiki. Numero 2010/1 aperis nur 9 semajnojn post 2009/3 – praktike ĝustatempe – kaj sendube rekorda ritmo-rekapto en la 35-jara historio de la revuo. Tamen, tiu atingo postulis intensivan intervenon de la demisiunta redaktoro, ne nur por pretigi la numeron sed transdoni sciojn. La decidiga momento estos ĉe numero 2010/2 – la liverplano por la novaj agantoj estas klare pretigita kaj akceptita – la rezulto indikos ĉu la nova teamo estas preta kaj kapabla definitive transpreni la laboron. La nombro de abonantoj por 2010 estas alarmiga; ni kredas, ke la malfruiĝo ludas nur etan rolon; la malbona ekonomia klimato trafas la revuon pli ol ĉe la remembrisoj por ILEI. Revuo estas pli malhavebla lukso ol membreco en organizo. Novaj laborfortoj necesas intensigi la varbadon. Aperis komuna JA/ILEI-varbilo.

MEMBROJ de ILEI; Abonantoj al Juna amiko

La membro-ciferoj por 2009 venas de raporto de la tiama sekretario en la 17a de julio, 2009, (655 membroj tiam) kun ĉiuj konataj ĝisdatigoj (674 nun).

La ciferoj por 2010 estas aktualigitaj de nia sekretario je julio 1, 2010. La ciferoj interkrampe montras kiom ricevas la revuon IPR papere kaj ne retabone.

La ciferoj por Juna amiko venas el la peranta vikio (junio 29).

Lando	M2009 sume (p)	M2010 sume (p)	JA2009	JA2010
Albanio (S)	6	6 (6)	*7	*7
Argentino (I)	1	1 (1)	1	1
Armenio (R-s-K)	0	5 (5)	*1	*1
Aŭstrio (I)	1	1 (1)	13	12
Aŭstralio (S)	6	9 (4)	3	0
Barato (R)	1	0 (0)	*7	*7
Belgio (S)	10	10 (9)	9	21
Benino (S-K)	5	5 (5)	20	**
Brazilo (S)	81 (39)	89 (47)	50	50
Britio (S)	5	1 (1)	13	6
Bulgario (s)	0	0 (0)	0	0
Burundio (S-K)	4	5 (5)	29	**
Ĉeĥio (S)	4	5 (5)	4	3
Ĉinio (S)	20	29 (20)	0	0
Danio (S)	13	14 (14)	2	1
Finnlando (S)	15 (9)	14 (6)	28	28
Francio (S)	34 (29)	46 (33)	38	33
Germanio (S)	82	79 (74)	11	11
Hispanio (s)	1	0 (0)	1	1
Hungario (S)	52	55 (38)	85	49
Islando (S)	2	1 (1)	3	1
Italio (S)	64 (60)	64 (58)	72	70
Japanio (S)	15 (15)	18 (10)	7	2
Kanado (S)	?	1 (1)	0	0
Katalunio	5 (5)	5 (5)	5	4
Kongo DR (R-s-K)	4	5 (5)	0	**
Korea Resp. (S)	4	15 (15)	0	0
Kroatio-KEL (S)	10	13 (1)	0	0
Kroatio-KEU (S)	6	7 (0)	0	0

Lando	M2009 sume (p)	M2010 sume (p)	JA2009	JA2010
Kubo (S-K)	3	5 (5)	*7	*7
Latvio (I)	1	0 (0)	0	0
Litovio (R)	3 (3)	2 (2)	*1	*1
Meksiko (I)	2	0 (0)	0	0
Nederlando (S)	21 (15)	24 (21)	3	1
Nepalo (I)	1	0 (0)	0	0
Norvegio (S)	8	6 (6)	2	1
Novzelando (R)	0	1 (0)	4	4
Novkaledonio (I)	0	1 (1)	0	0
Pollando (S)	20	27 (9)	29	13
Rumanio (S)	18	18 (1)	0	0
Rusio (S)	1	1 (1)	6	5
Serbio (R-s)	6	5 (5)	0	0
Salvadoro (I)	1	1 (0)	6	0
Slovakio (I)	0	2 (0)	3	0
Slovenio (I)	1	1 (1)	0	0
Svedio (S)	32	0 (0)	10	5
Svisio	16 (14)	17 (10)	21	6
Togo (S-K)	5 (5)	4 (4)	10	** 5
Ukrainio	35 (2)	34 (2)	0	0
Usono-Kanado (S)	49 (26)	52 (28)	13	17
Afriko sume	-	-	94	**11
Sume	674	704 (466)	650	350

Klarigoj ĉe ILEI:

S = Landoj kun sekcio
R = Lando kun reprezentanto
I = Lando kun nek, nek.
s = Lando kun planoj fondi sekcion
K = Koleghelpkasa subteno.

Klarigoj ĉe Juna amiko

* = subtenaj liveroj
** = pro manko de laborfortoj
la Afrika abonado restas
neorganizita por 2010.

Ĉe Juna amiko ne ĉiuj landoj estas listigitaj, tial 650 kaj 350 ne estas precize la sumoj de la ciferoj.

En julio 3 la sekretario raportas sekvajn ĝisdatigitajn nombrojn: 718 membroj, 218 retaj, 482 paperaj.

Landoj kontentigaj ĉe ILEI kaj Juna amiko:

Brazilo, Finnlando, Francio, Hungario (sed abrupta falo ĉe JA), Italio, Pollando.

Landoj pli fortaj ĉe ILEI ol ĉe JA:

Ĉinio, Germanio, Japanio, Korea Resp., Nederlando, Rumanio, Ukrainio, Usono.

Landoj pli fortaj ĉe JA ol ILEI:

Aŭstrio, Britio.

Financa raporto

La bilanco kaj stato de fondusoj estos prezentitaj surloke. La rezulto de la krakova konferenco venis nur en lastaj tagoj, do la raporto ne estas revizorita.

Rezultkalkulo de ILEI por 2009

Elspezoj		
	Buĝeto	Reale
	2009	2009
Aktivuloj (afranko, vojaĝoj, ktp)	1200	407.18
Bankokostoj (pro ĝen. kaso)	60	64.40
Estraro	4800	3208.74
afranko, reto, ktp	1500	1119.41
kunsidoj	3300	2089.33
Fakaj k.a. kotizoj	500	444.41
Honorarioj ĝeneralaj	300	80.00
Informado	200	144.55
IPR	6700	6722.15
presado	3000	3640.00
redaktado	1000	1000.00
sendado	2700	2082.15
Juna Amiko	6150	5282.48
presado	2200	1719.72
redaktado	1250	801.82
sendado	2700	2760.94
Libroj (materialo, presado)	200	2000.00
Projektoj	6000	3734.87
Flugiloj	1000	192.00
Instruista trejnado	2000	250.00
Interkultura agado	3000	3292.87
Rentumo uzata por pasivoj	0	304.87
Profito	20	
Sumo	26130	22393.65

Deskribo de librostokoj 2006: 180 EUR, 2007: 80 EUR, 2008: 80 EUR, 2009: 80 EUR

Enspezoj

	Buĝeto	Reale
	2009	2009
Donacoj (al ĝenerala kaso)	2100	426.20
Ekzamenoj nete	200	0.00
Konferenco	2200	3908.81
Konferencokostoj		-18016.43
Konferencokotizoj		21925.24
Kotizoj	8850	7553.80
A-landaj	7200	5562.00
Abonoj IPR	300	280.80
B-landaj	1000	1211.00
Retaj	350	500.00
Rentumo	150	304.87
Subvencioj	7450	3734.87
Projekta subv. de UEA	1650	1650.00
Fonduso Flugiloj	800	0.00
Fonduso Interkulturo	3000	1834.87
Fonduso Szerdahelyi	1000	250.00
Ekstera subvencio	1000	0.00
Juna Amiko (abonoj)	4380	3779.66
Abonoj	4300	3522.27
Vendoj kaj donacoj	80	257.39
Vendoj (libroj)	800	202.39
Deficito (sen kalkuli deskribon kaj kurzodiferencojn)	0	2483.05
Sumo	26130	22393.65

Kurzodiferencoj 2006: +1528 EUR; 2007: -1380 EUR; 2008: :- 4995 EUR; 2009: 632 EUR.


Kion faris ILEI en 2009?

- Intensigis la informfluan tra niaj listoj kaj regule sendis novajn erojn al la hejmpaĝa prizorganto (Jozefo Nemeth), kiu tuj afiŝis ilin.
- Organizis la 'Tagon de la Lernejo' kaj aktivis en UK 2009
- Aperigis dupaĝan raporton kun fotoj en *Esperanto* pri la 42a konferenco.
- Aperigis sekciajn raportojn 2008 en unu kohera publike alirebla dokumento.
- Vastigis la reton de partneroj de du ĝis dek, aldoninte utilajn informojn.
- Reorganizis la komisionojn por ke ili interagu regule kun la estraro.
- Transigis kontojn kaj sciojn al nova kasisto kaj malfermis novan bankokonton en Nederlando.
- Transigis la sidejon de la ligo al la Centra Oficejo de UEA.
- Pretigis kaj disponigis tra nia hejmpaĝo serion da varbiloj.
- Realigis konkretan subtenon al instruista trejnado ĉe UAM en Poznań.
- Sukcese prezentis sin en la Malferma Tago de CO novembre (vidbendita).
- Aktualigis la 20-jaraĝan interkonsenton inter UEA kaj ILEI.
- Sekurigis €2500 da financado de UEA por la agado en 2010.
- Reeldonis la verkon *Manlibro pri Instruado de Esperanto*.
- Akceptis kun UEA regularon por ekzamenoj por blinduloj.
- Planis kun <edukado.net> pretigon de ret-kurso pri instruista trejnado.
- Konsentis kuneldoni kun E@i verkon *Detala Gramatiko de Esperanto*.

La supra listigo ekskludas agadojn kiuj estas aliloke raportitaj en pli granda detalo. Ĝi celas doni superrigardon pri la jaro.

La listo de malatingoj de la jaro estas prezentita aliloke en ankoraŭ pli longa listo. Ni devas taksi la jaron 2009 transira al estaro kiu enhavas novulojn en Slosilaj postenoj, kun foje malsufiĉaj mekanismoj por glata transigo. Do, pli grandskala antaŭeniro kuŝas ankoraŭ por la estonto. Ne mankas planoj kaj ideoj – sed malsufiĉas la plenumantoj!

(smg)



Raporto de la Ekzamena Komisiono (koncizigita)

Konsisto de IEK

2009 estis elektojaro. La IEK estas elektita fare de la Komitato de UEA kaj de la Komitato de ILEI. Rekandidatiĝis kaj reelektiĝis Monika Molnar (vicprezidanto, Hungario-Svislando), Reza Torabi (Irano), Mirejo Groĵan (prezidanto, Svislando). Novaj membroj estas Jeremie Sabijumva, Burundo, Han Zuwu, Ĉinio, Karine Arakeljan, Armenio, Giridhar Rao, Barato. La mandato de IEK estas trijara: 2009 – 2012.

Du paralelaj ekzamensistemoj

Aldone al la Internaciaj Ekzamenoj (IE) de ILEI kaj UEA, naskiĝis la KER-ITK ekzamenoj de UEA, en la manoj de Ekzamena Komisiono de UEA: Zsafia Korody, Katalin Kovats kaj Renato Corsetti. Tiu sistemo estas en la manoj de la ŝtata ITK-ekzamencentro en Budapeŝto, do ĝi ebligas ricevon de ŝtate kaj EU agnoskita diplomo. IEK estas bone informita pri la nova ekzamensistemo: Mirejo Grosjean sukcesis en la nivelo C1 kaj en la lertigado kiel ekzamenanto laŭ la KER-ITK sistemo. Monika Molnar havas universitatan diplomon pri Esperantologio kaj Interlingvistiko kaj sukcese faris la lertigadon kiel ekzamenanto laŭ la KER-ITK ekz. Sistemo.

La nuna sistemo kun du ekzamenaj komisionoj devenas el historiaj konsideroj. Kiel la sistemo evoluos en la estonteco? Ni klopodos bone labori ene de nia movado por kontentigi niajn membrojn kaj en niaj rilatoj kun la ekstera mondo, ĉefe kun ITK en Budapeŝto, kun Konsilio de Eŭropo, kiu vartas pri Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) kaj kun ALTE.

Verkado de TESTOJ por IE de ILEI UEA

Tiu tasko efike kaj glate funkcias, en kunlaboro kun tro malmulte da personoj. Estas bona kunlaboro (verkado kaj korektado) ene de IEK kaj en kunlaboro kun diversaj personoj eksteraj, ĉefe du samideaninoj el Armenio.

SESIOJ de IE de ILEI UEA en 2009

Planitaj sesio en Krakovo kaj Bjalistoko ne okazis. Sesio okazis en Lomé, Togolando, decembro 2009, En la elementa nivelo 3 kandidatoj ne sukcesis en la gramatika testo, 6 kandidatoj faris la elementan nivelon sed nur unu sukcesis: Sinjoro Kokou Hézékiel Kede Gadji. En la meza nivelo 7 kandidatoj faris la mezan nivelon. Unu sukcesis: kun nivelo „kontentiga”: Ouro Agoro Tchatikpi. Entute 2 personoj sukcese trapasis la ekzamenojn dum 2009.

Rekomendoj de IEK en 2009

En marto 2009 IEK skribis al ĉiuj landaj asocioj kun rekomendo, ke okazu en la landaj asocioj ekzameno je SOJLA NIVELO eventuale kun traduko.

Elaborado de ekzamenoj por blinduloj

Naskiĝis nova regularo pri ekzamenoj por blinduloj. Ekzistas "ĝenerala regularo" kaj "detala regularo kun poentokalkulado". La Komitato de UEA same kiel la Komitato de ILEI aprobis la ĝeneralan regularon en la someraj kunvenoj de 2009. La unua sesio estas antaŭvidita por UK Kopenhago en 2011. Tiu aprobo okazas en la jubilea jaro de la naskiĝo de Louis Braille.

Internacia Rajtigita Ekzamenantaro IRE

IRE ricevis plurajn novajn membrojn laŭ la bezono de la okazigataj sesioj. La perreta voĉdono bone antaŭeniras. Nun IRE nombras 111 personojn. La nova IEK decidis pri forigo de 8 neaktivaj membroj de IRE

Novaj membroj en IRE: Rikardo Rokicki, Pollando, Jens Larsen, Danlando, Francesco Reale, Italio-Svislando, Jonas Dalmose, Danlando, François Bartsch, Francio, Roman Dobrzinski, Pollando, Heidi Goes, Belgio

Kunlaboro kun retejoj

Ekzistas kunlaboro kun retejoj de **ILEI** kaj **edukado** punkto **net**, kie aperas detalaj informoj pri ĉiu aspekto de la ekzamenoj.

Taskoj por la estonteco

- Sekvi la sesiojn, kontroli la konsiston de LEK kaj verki testojn. (daŭra tasko)
- Grandigi IRE-n. (jam survoje)
- Havi perretan arkivejon (jam survoje)
- Sekvi la evoluigon de la novtipa ekzamena sistemo en kunlaboro kun la komisiito de UEA kaj estrarano de ILEI Zsafia Korody. (jam survoje)
- Dokumenti la financajn aspektojn de la ekzamenoj. (jam survoje)
- Sekvi la evoluon en rilato kun sistemo de diplomo pri esperanto-instruado.

Mirejo Groĵan (Mireille Grosjean) prezidanto de IEK.
Les Brenets, Svislando, la 25an de februaro 2010

Ĉi tio estas koncizigita versio de la plena raporto de IEK por 2009, kiu videblas ĉe www.ilei.info.

Proponata regularo por retaj voĉdonoj

Ĉi tiu dokumento estos propono al la komitato. La estraro jam aplikas ĝin por si.

Motivigoj por reta voĉdonado:

- Tio efikigas la laboron ĉar ĝi permesas decidadon tra la tuta jaro, bazita sur kiel eble plej vasta opinisondado.
- Komitata retvoĉdonado permesas tutmondan partoprenon kaj ne limigas la decidorajton al tiuj landaj sekcioj kies komitatanoj aŭ anstataŭantoj povas partopreni konferencojn.
- Obstakloj atingi retkonektojn ege malpli realas ol obstakloj fizike atingi konferencojn aŭ decidokunvenojn.

Proceduro:

1. Proponojn por voĉdonado oni sendas al la sekretario kaj prezidanto, kiuj post konsultiĝo povas iniciati voĉdonon aŭ motivi la kialon ne fari tion. Proponoj pri malfondo de la ligo, ŝanĝoj al la statuto aŭ pri estrarelektoj ne estas voĉdoneblaj rete.
2. Voĉdonadon organizas la sekretario kaj/aŭ la prezidanto per mesaĝo kiu prezentas precize formulitan voĉdonproponon sekvata de detaligo pri la kialoj kaj sekvoj de la voĉdono.
3. Tiu mesaĝo lanĉas la debatan fazon. Por estraraj elektoj tio daŭras 7 tagojn, por komitato 21 tagojn. La mesaĝo povas esti sendita al pli da homoj ol estas voĉdonrajtaj; por ke ili estu informitaj kaj povu kontribui al la debato. Ĉe komitataj voĉdonoj, tipe la sekciestroj ricevos la mesaĝon; ĉe la estraro, observantoj kaj estraraj komisiitoj ĝin ricevos. Oni respektas (r)etiketon kaj la unikan kulturan diversecon de la partoprenantoj. La prezidanto kaj sekretario aŭ ties delegito mastrumas la debatadon.
4. Se la debata fazo kreis proponon modifi la originan proponvortumon, la prezidanto kaj sekretario decidas ĉu tuj pluri kun modifita kaj konsentita teksto aŭ voĉdonigi la modifon aparte antaŭ ol voĉdonigi la (ne)modifitan proponon mem.
5. La sekretario kaj prezidanto tiam lanĉas la veran voĉdonon. Ĉi tiu mesaĝo estas sendita nur al voĉdonrajtigitoj kaj havas la precizan voĉdonotan proponon, eventuale kun aldono de resumo de la rezultoj de la debata fazo. La voĉdona fazo daŭras por estraraj voĉdonoj ĝis maksimume 7 tagoj – ĝis plimulto da unudirektaj voĉoj estas atingitaj. Komitata voĉdono daŭras 14 tagojn, tiel ke ĉiu voĉdonrajtigito havas eblon registri sian voĉon. Voĉdonelektoj estas tipe: JES, NE, SINDETENO. Tiukaze, simpla plimulto da jesaj aŭ neaj voĉoj decidas la demandon.

6. La voĉdona mesaĝo havas temlinion kun la sekva strukturo, por ke ĝi estu kiel eble plej rimarkebla: VDON-E-2010-01 [Temo]. La kvina litero estas "E" por estrara voĉdono kaj "K" por komitata. La lastaj du ciferoj estas serio-numero.
7. Kiu volas voĉdoni publike respondas en la mesaĝ-fadeno, lasante la temlinion senŝanĝa. Kiu volas voĉdoni private faras tion en nova mesaĝo kun la sama temlinio kaj sendas ĝin nur al la prezidanto kaj sekretario.
8. Oni rajtas plue diskuti tra la voĉdona fazo, sed oni faru tion ĉe la disksutiga mesaĝfadeno, ne pere de la voĉdoniga fadeno.
9. Kaze de maleblo atingi retaliron tra la voĉdoniga periodo, rajtigito povas komuniki sian voĉon alimaniere (ekz. letere, SMS-e aŭ telefone)
10. La voĉdonrezultoj estas registritaj loke ĉe la prezidanto kaj sekretario. Ili publikigos la respondintojn - ekzemple tra komitata vikio, por ke voĉdonintoj havu manieron konfirmi la sekuran alvenon de la voĉdono. Fine de la voĉdona periodo la rezulto estas komunikita, kaj aldonita al registro de voĉdonoj en la liga retejo. La unuopaj voĉdonmesaĝoj estas tiam forigitaj el la retpoŝta sistemo.
11. La venonta orde kunvokita fizika kunsido de la organo kiu voĉdonis pritraktas ĉiujn faritajn retajn decidojn kaj konfirmas aŭ malkonfirmas ilin.

Konferenco 2011: Kun la lingvo de amo en la lando de Hamleto

En la jaro 2011 ILEI konferencos en Kopenhago, la semajnon antaŭ la UK, de la 17-a ĝis la 23-a de julio, kun la tradiciaj kleriga, faka, organiza kaj kultura programoj, sed ĉiam kun freŝaj novaj detaloj. Fake, la konferenco koncentriĝos al lingva politiko de ŝtataj kaj klerigaj institucioj, lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado, kaj pozicio de Esperanto en tiu kunteksto.



La tradicia ILEI-simpozio pri konferenca temo okazos en la lastaj du konferencaj tagoj, en kunlaboro kun la Universitato de Kopenhago, kiu ankaŭ disponigos la konferencejon. La loĝado estos aranĝita en la komforta sed ne tro luksa hotelo Cabin, proksima al la konferencejo, kaj en studenta domo, malpli kosta, sed ne tre malpli komforta. Favorkosta manĝado eblis en la universitata bufedo tute proksime de la konferencejo. Dumkonferencaj ekskursoj ebligis konatiĝi kun la lando de Hamleto kaj ĝia ĉefurbo.

Konferenca Libro: pretigo kun kompildatoj: SMG, Junio 24/29/30, Julio 3/4 2010